

## Cimerman kaj Poludnica

*Verkis Karel Votoček*

Enkonduko: La plej eminenta eltrovinto, verkisto, muzikkomponisto, pentristo kaj skiisto el la tuta mondo estis forgesita ĉeĝa geniulo Jára Cimerman. Pri tiu fakto ni povas diskuti, ni povas disputi, ni povas eĉ malkonsenti, sed tio estas ĉio, kio estas tiukaze farebla.

Estimataj samideanoj!

Mi emas vin konatigi kun miaj esploroj rilate agado de Jára Cimerman en ĉarma slovaka vilaĝo Liptovský Ján. Entute kvinfoje mi ekskursis en la vilaĝon rekognoskante spurojn de la fama ĉeĝa geniulo. Tamen la rezulto surprizis min.

Unue mi detale trastudis vilaĝan kronikon de la jaro 1337 ĝis 1960, kiam la vilaĝo estis aligita al urbeto Liptovský Hrádok. Pluaj informoj troviĝis en ĝia kroniko ĝis la jaro 1993, kiam Ján denove fariĝis memstara vilaĝo.

Al mi multe helpis Jano Biely, kronikisto de la vilaĝo kaj samtempe direktoro de loka lernejo. Plua helpo venis de praga filio de Goethe-instituto, kies dungitoj tradukis por mi kelkajn malfacile kompreneblajn partojn de la kroniko. Precipe la germana lingvo de la kronikisto Johann Weiss iam eĉ flue ŝanĝadis al la pola, kiel tion taksis doktoro Staszowiecki.

Plua fonto de informoj estis loka matrikulo. Ĝian trastudadon malfaciligis fakto, ke kelkaj volumoj mankis. Ekzemple la volumoj el jaroj 1542-1633 estis transportitaj al ĉefepiskopeja arĥivo en Krakovo, kvankam la vilaĝo Liptovský Ján al ĉi tiu ĉefepiskopejo neniam apartenis. Tial konvenas danki ankaŭ al doganisto Ján Zlota en limtrapasejo Jablonka – Trstená. Li nin volonte lasis iri hejmen post nia garantio, ke ĉiuj kestegoj en nia ŝarĝaŭto enhavas nur doganliberan rumon. Danke al tiu malgranda mistifiko ni sukcesis post multaj jaroj redoni la valorajn dokumentojn pri nia lando al ilia ĝusta loko – humida kelo de dekana oficejo en Liptovský Mikuláš.

Plua punkto de ebla krizo estis enskriboj inter la jaroj 1870-1945, kiuj estis malfacile legeblaj pro ripetata transskribado de la nomoj kiel ekzemple Hans Weiss – Janko Biely – János Fehér – Janek Bialy – Jan Bílý ktp.

Mi sukcesis eĉ akiri libron de gazeteltondaĵoj el loka korpeduka klubo TJ Štart. Ĉi tiun unikan libron mi interŝanĝis kun sekretariino de la klubo Mária Pilková por sesa volumo de Lenin-verkaro (formato de ambaŭ libroj estis la sama, kio estis la plej grava postulo, ĉar la libro estis uzita kiel submetaĵo sub florpoto).

Entute mi trastudis almenaŭ 128 000 paĝojn, precipe manuskriptojn, skribitaj per 5 lingvoj: germana, slovaka, hungara, pola kaj ĉeĝa. Tial mi povas respondece deklari, ke mi en ĉi tiu

vilaĝo trovis neniun spuron pri la forgesita ĉeĥa geniulo Jára Cimerman. Verŝajne li neniam vizitis la vilaĝon nek kontaktis iun vilaĝanon.

Tamen ascendinte la monton Poludnica mi estis surprizita per tiea Esperanto-obo. Temas pri ŝtontumulo, sur kiun esperantistoj ĉiujare aldonadas pluajn ŝtonojn, kiujn ili alportis el iliaj vojaĝoj. Ĝia kreiĝo ne povas esti hazardo. Verŝajne ĝin fondis Jára, ĉar neniuj samtempulo krom li tion kapablis. Por tiu nekutima sublima ago necesus almenaŭ 2 personoj, ĉu ne?

Mi kredas, ke per ĝia daŭra konstruado ni plej bone glorigos memoron pri Jára da Cimerman.

*Klarigoj por eksterlandanoj:*

*Ján Zlota (origine Slotá) estas slovaka politikisto fama pro troa trinkado de alkoholaĵoj.*

*Ján Weiss kaj Mária Pilková estas miaj amikoj, kiuj ĉiujare partoprenadas la suprengrimpadon al monto Poludnica ĉe Liptovský Mikuláš.*

*Esperanto-obo estis fondita post partopreno de 2 mongolinoj en la suprengrimpado.*

*Nekutima vorto „sublima“ signifas fakte „grandioza“.*

*Prezentite dum la aranĝo POLUDNICA en januaro 2019*